LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

## LA PREDIKO DE DRINKULO.

La predikon faris la drinkulo al grupo da gajaj junuloj, kiu kunvenis en restoracio. La junuloj multe mokis la drinkulon, kiu petis subtenon. Ili ordonis doni al li kaliketon da brando kaj komencis persvadi lin, ke li faru paroladon. La nekonato fortrinkis la brandon kaj komencis, serioze kaj glate:

„Miaj sinjoroj! Kiam mi tiel rigardas vin kaj min, ŝajnas, kvazaŭ mi vidus bildon de mia propra juneco kaj de mia pli frua forto, de kiu hodiaŭ restas nur fibraĉoj. Mia ŝvelinta vizaĝo estis iam tiel glata kaj bela kiel viaj vizaĝoj. Nun mi pene iradas, iam mi iris rekta kaj fiera. Ankaŭ mi iam posedis domon, familion kaj postenon. Mi havis belan edzinon, sed baldaŭ mi piedpremis ŝian virinan honoron. En kaliketo mi dronigis ŝian respekton. Mi havis infanetojn, tiel belajn kaj karajn, kiel printempaj floroj kaj mi rigardis, kiel ili malaperis antaŭ miaj okuloj kaj mortis pro malsato kaj malvarmo inter la malbenoj de ebria patro! Jes, mi havis propran hejmon, sed mi estingis tiun sanktan fajron kaj de tiam la mallumo, malvarmo, detruo kaj morto ekregis tie. Hodiaŭ mi estas edzo sen edzino, patro sen infanoj, senhejma vagulo, de kiu ĉiuj pli noblaj sentoj estingiĝis. Mi mortos kiel drinkulo!"

La mizerulo finis, liaj okuloj eklarmis. La kaliketo falis el la

tremanta mano kaj rompis la tomban silenton, kiu regis post liaj vortoj. Antaŭ ol la junuloj rimarkis tion, li jam ne plu estis en la ĉambro. Kaj subite ili eksaltis de siaj seĝoj. Ili sentis, ke ili ĉeestis neforgeseblan predikon. En iliaj oreloj daŭre sonis tiu profunde skuanta kaj malgajega frazo: „Mi mortos kiel drinkulo!"

Francisko Walas, Bielsko, Polujo.

## ĈU VI KOMPRENAS TION?

Diru, patro, se estas milito, kiel estas tio en la milito, ĉu oni tiam pafas homojn?

Kial vi demandas tion, mia filo?

Diru do, patro, ĉu tiam oni pafas homojn?

Jes, oni pafas homojn.

Kiel do? Ĉu akurate tiel, kiel Steffens pafas neĝkokojn? Ĉu oni vere celas per pafilo?

Jes, kelkfoje.

Ĉu tio ne estas malbona, celi homojn per fusilo? Ĉu tio ne estas malpermesata? Ĉu iu, kiu mortigis iun, ne mem estos mortigata?

Kelkfoje, mia filo, sed ne ĉiam.

Kial do ne ĉiam? Ĉu ne estas malbone mortigi homojn?

Jes, kompreneble tio estas malbona.

Ĉu do tiuj, kiuj iras en la militon, ĉiuj estas malbonaj homoj?

Ne, tute ne. Kelkfoje ili estas bonaj.

Ĉu bonaj? Ili ja faras tian malbonon!

Ili ja ne mem aranĝas tion, mia infano.

Ĉu ili ne mem aranĝas tion? Ĉu ili ne povas diri: Mi ne volas mortigi?

Ne, tion ili ne povas fari. Tiam ili estus pafataj.

Ĉu pafataj? Ĉar ili diras, ke ili ne volas mortigi? Kiu pafas ilin tiam?

Tiu, kiu ordonas al ili iri en la militon, tiam enkarcerigus ilin aŭ eĉ pafus ilin.

Nu, tiu ja devus esti tre malbona homo! Patro, kiu do ordonas al ili iri en la militon?

Mia knabo, tio ne estas unu homo. Almenaŭ, plej ofte ne. Tio estas la registaro. Ĝi sendas la homojn en la militon.

Ĉu la registaro? Kio estas tio, patro?

Ĉu vi ne scias tion? Tio estas la homoj, kiuj fiksas tion, kio estu farata.

Ĉu ili fiksas tion, kio estu farata? Kial ili farigas tiom da mal-

bono? Ĉu ili ĉiuj estas malbonaj homoj, patro? Kial ili ne farigas ion belan?

Ne ĉiuj el ili estas malbonaj homoj. Ja, kelkaj sendube estas malbonaj, sed aliaj estas bonaj. Tiel tio nun estas tia.

Do, se ili ne estas tiel malbonaj, kial ili forsendas la homojn en la militon kaj pafas ilin, se ili ne iras?

Tio estas laŭ la leĝoj.

Ĉu leĝoj? Sed tiaj leĝoj estas malbonaj!

Ne, la leĝoj ne estas tiom malbonaj, almenaŭ ne ĉiuj. Sen la leĝoj ni ne povus vivi.


Mi ne komprenas! Ne vivi! Ĉu vi ne diris, ke laŭ la leĝoj la homoj devas iri en la militon kaj ke ili estos pafataj, se ili ne iros?

Nu, ĉesu, mia knabo. Lasu tion. Tio estas tro malfacila por infanoj. Vi ne komprenas tion, ankaŭ ne, se mi ĉion klarigus al vi.

Ĉu vi tute komprenas tion, patro?

Nun ĉesu, knabo! Sufiĉas! Mi jam diris al vi, ke vi ne komprenas tion!

El la islanda lingvo tradukis Cavriago.




**Silueto de Konstanz.**

## KONSTANZ (daŭrigo).

Sed antaŭ ĉio, Konstanz estas urbo de bonhumoro. Ĉi-tie eble ankoraŭ postrestis io de la Viena heredaĵo, ĉar ĝis 1805 Konstanz ja apartenis al Aŭstrujo. Matenaj kaj vesperaj koncertoj en la urba ĝardeno, ĉambromuzikaj serenadoj en la urbdoma korto, ĥoraj koncertoj, kastelaj koncertoj sur la insulo Mainau k.t.p. Kiu serĉas alian distron, iru al la „Deutsches Theater", kie altnivela kaj diversspeca programo kontentigas ĉiujn direktojn.

La granda donacinto de vivo kaj ĝojo estas tamen la lago. Je ĝiaj bordoj — Konstanz disponas pri 3 bordbanejoj — funkcias ĝis la malfrua aŭtuno gaja banvivo. Sur ĝia opala supraĵo glitas elegantaj velojaĥtoj, ĝiajn ondojn tranĉas la takte batantaj remiloj de graciaj remboatoj, dum ĝiajn bordojn ligas malgrandmaŝa reto de vaporŝiplinioj.

De Konstanz elradias ĉiuj vaporŝiplinioj. Kien vi volas veturi? Ĉu al la insulo Reichenau en „Untersee" kun ĝiaj miljaraj preĝejoj, al la insulo Mainaŭ [1]) kun ĝia belega rozoĝardeno, ĝiaj kulturitaj parkoj, sidejo de vizitota internacia universitato, al Überlingen,



Korto de la urbdomo

la „Germana Nice" [1]), al la Zeppelin-urbo Friedrichshafen, al la insula urbo Lindau [1]) aŭ al la aŭstra perlosimila Bodensee-urbo Bregenz [1]), la elirpunkto por Orientaj Alpoj? Ĉien vin portas la belaj ŝipoj. Sed al Meersburg [1]), romantika vin- kaj kastelurbo, krome iras ankaŭ la urba pramo en daŭra pendolotrafiko.


Svislando troviĝas tute apud Konstanz. Al la mondfama Rejn-akvofalego de Schaffhausen (Svislando) nin kondukos 50-kilometra ŝipveturado sur Rejno, kiu, impete fluante inter krutaj arbaro-kovritaj deklivoj kaj sesfoje transirita de unu el la plej komplikaj landlimoj en Eŭropo, prezentas la imponan spektaklon de ĝia ŝaŭmanta akvofalego apud Schaffhausen.

Je la alia flanko de Bodenlago, en Aŭstrujo, en Bregenz, ŝnur-vagonaro portos nin supren rekte al montara alteco. De la pinto de Säntis ni ĝuos brilan superrigardon pri la tuta regiono. Ni vidos, kiel sube, en la lagoplenigita valo, pace kuŝas unu apud la alia Aŭstrujo, Svislando kaj Germanujo, borderantaj ĉiuj la montaron respegulantan bluan lagon: „Bodensee".

En tiu alloga pejzaĝa kadro okazos nia ĉi-jara TJO-Kunveno. Konstanz, unike favora ejo por nia kunveno, gastigos dum unu semajno familian kaj amikan rondon de junaj samlingvanoj!

---

[1]) Tiujn urbojn ni i.a. vizitos en la kadro de nia programo.




# I.L.E.I.-RUBRIKO.

*Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam (Ned.). Centra Informejo: E. Dahl, Uddevalla, Svedujo.*

## Publika Lernejo 400.

Oni multe faras, diverslande, por la edukado de subnormalaj infanoj. Ĉiuj konsentas, ke estas bone tion fari. Efektive multe da pedagogia scio venas de la studo de tiuj malfacilaj infanoj sub la normala inteligento.

Tamen, ĉu vi iam pripensis la dezirindecon starigi lernejon por supernormalaj infanoj?

La Ŝtato de Novjorko antaŭ pli ol dek jaroj opiniis tiun dezirindecon tiel urĝa, ke ĝi starigis apartan lernejon por tiu celo.

La sola enirrajtigilo por lernejano en tiu ĉi unika lernejo estas la inteligento. Estas nenia barilo, ĉu de monhavo de gepatroj, socia rango, ĉu de raso.

Jam montriĝas kelkaj faktoj. Inter tiuj mense aristokrataj infanoj, kies inteligentkvocientoj estas inter 130 kaj 200, estas membroj de diversaj rasoj: negroj, infanoj de eŭropa deveno, judoj kaj ĉinoj.

Do la mito pri la natura stulteco de la negro ricevis fortan baton. Ne pli bone sukcesis la multe disvastigita opinio pri la natura supereco (laŭ vidpunkto de la inteligento) de membroj de la juda raso aŭ rasoj. Judaj infanoj studas en la lernejo, sed ne pli multnombre ol oni atendus de la nombroj de judoj en la ŝtato Novjorko.

Nek estas trovita malsama meza inteligento inter la seksoj. Efektive la plej alta inteligento-kvociento iam registrita estas de knabino en tiu ĉi lernejo.

La lernejanoj venas al publiklernejo 400 de aliaj lernejoj. Ofte iliaj raportoj informas, ke ili ne tre bone enmiksiĝis en la ĝenerala lerneja vivo. En la ludejo ili ofte staris kaj milde kaj bonhumore rigardis la ludantajn kamaradojn, sed ili tute ne volis kunludi kun ili. En la klasĉambro ili rapide lernas kaj tediĝas, se oni ne povas provizi por ili apartan laboron, taskon, kiu ne estas tre facila.

En la lernejo, kiun ni nun pritraktas la lernantoj ricevas matene lecionojn de la kutima speco, sed en la posttagmezoj studas laŭvole.

Venis al la lernejo knabo, kiu en la antaŭa lernejo ĉiam faris mapojn, negrave en kiu leciono. En sia nova lernejo li trovis matene lecionojn, kiuj streĉis lian menson. En la posttagmezo li faris mapojn tre bonajn.

La kaŭzo de tiu aranĝo estas la fakto, ke, se oni instruus dum la tuta tago laŭ la kutima maniero, la gelernantoj laŭ scio kaj inteligento estus pretaj por la universitato eble de la 12-a ĝis la 14-a jaro. Eĉ se la universitatoj akceptus studentojn tiel junajn, tiuj pro emociaj kaj aliaj kaŭzoj ne povus plene partopreni la studentan vivon. Per la uzata metodo ili prepariĝas malpli rapide kaj estas pretaj por la universitato je la kutima aĝo, sed kun multe pli riĉa mensa fono ol la kutima.

Eble tiu ĉi mallonga priskribo interesos kelkajn kaj instigos ilin pripensi la problemon de la edukado de supernormalaj infanoj, kiuj poste havos tiom por aldoni al la monda kulturo.

E. K. Osmotherly, Londono, Britujo.

## Esperanto en la lernejon!

Dank' al la granda amiko de la Esperanto-movado: direktoro Jozefo Bodzinski (direktoro de la Liceo de Belaj Artoj kaj la Liceo de Fotografiko) mi gvidas konstantajn lecionojn de Esperanto en ambaŭ lernejoj jam la kvaran jaron kiel devigan fakon. En la nuna jaro entute 139 gelernantoj (14-20-j.), en kvin klasoj, lernas E-ton. Ĉar la lecionoj regule okazas po 2 horoj semajne, la progresoj estas sufiĉe grandaj.

Krome en la Komerca Liceo en Gdynia estas kurso por 22 geknaboj. Ankaŭ en Slupsk kaj en Elblag en Komercaj Lernejoj kaj en Koopera Liceo en Wrszcz estas kursoj kaj Esperanto-Rondoj.

J. Toczyski.

En la mezgrada teĥnika lernejo „Technicum" (Eendrachtsweg 26-27, Rotterdam, Ned.), Esperanto estas deviga fako en la unuaj tri klasoj, do en la kadro de la instruprogramo. 45 knaboj (13-19-j.) sekvas la Esperanto-kursojn kaj jam diligente korespondas kun geknaboj en la tuta mondo. Instruistoj estas s-ro De Goey kaj la direktoro de la lernejo, Inĝ. B. B. de Regt c.i.

## Internacia kaj feria Esperanto-Kurso en Francujo.

G. E. E. (Asocio de Esperantistaj Geinstruistoj) aranĝos antaŭ la Universala Kongreso internaciajn Esperanto-kursojn, kun feria restado. La kunveno okazos en agrabla loko, ĉu apudmara, ĉu en la ĉirkaŭaĵo de Parizo. Okazos kursoj por komencantoj. progresantoj kaj spertuloj. La tuta aranĝo daŭros tri semajnojn, sed oni ankaŭ povas partopreni du, aŭ unu semajnon.

Interesatoj jam nun sendu viajn nomon kaj adreson por ĝustatempe ricevi cirkuleron kun detaloj. Kiu deziras respondon al personaj demandoj bonvolu aldoni ĝuste stampitan respondkuponon.

Adreso: f-ino Jeanne Dedieu, 3 rue Arzac 3, Toulouse, Francujo.

---

**Reciproka helpo:** Germanoj, kiuj ĉijare deziras vojaĝi eksterlanden volonte gastigos samideanojn el la lando, kiun ili deziras viziti, aŭ pagos por ili vojaĝelspezojn, por tiel solvi la devizan problemon. Interesuloj tiucele povas direkti sin al: H. J. Togeretz, Düsseldorf-Rath, Kreuzweg 6, Germanujo.

Ankaŭ la Germana Esperanto-Asocio, (13b) München-Pasing, Engelbertstr. 7, pretas peri, same kiel la antaŭan jaron. Oni sufiĉe frue interkontaktu!

---

**PROPAGANDU „LA JUNA VIVO"n EN KURS- KAJ GRUPVESPEROJN!**

**Pligrandigu la abonantaron, kaj ni pligrandigos la gazeton!**

**Karaj Lernejanoj,**

Ĉu vi jam bone legis la januaran numeron? Mi bedaŭras, ke ĝi venis tiom malfrue! Esperebie vi tamen havis sufiĉe da tempo por la konkursrubriko! Estas strange, ke preskaŭ nur el Anglujo venas solvoj. Ĉu la konkursoj estas tro malfacilaj? Aŭ ĉu la alilanduloj estas tro maldiligentaj? Ni scivolas pri tio! Sed mi konsilas al vi: faru vian eblon, ĉar vi povas gajni belan premion. Aŭ, por enigmoj, poentojn. Ja estas interese, kiam via nomo aperas en „La Juna Vivo".

Ĉu vi legis la verkaĵon pri la pego en la decembro numero? Kelkaj lernantoj de la „Wrotham Hill School" en Wrotham (Britujo) sendis belajn leterojn pri ĝi. La Edamâj infanoj tre ŝatis tion! Certe ili jam sendis sian desegnaĵon al Wrotham? Ili havas propran presilon, per kiu ili mem presas sian lernejan gazeton, ankaŭ la bildojn. Por ĉi tiu numero ili desegnis galantojn, kiuj nun jam floras en Nederlando.

N. K.

## „Nova Espero".

Certe vi memoras Stanley kaj Colin Smith, kiuj per sia malgranda velŝipo „Nova Espero" veturis de Kanado al Britujo. Ni ricevis de ili jenan saluton:

„Ni sendas bondezirojn al ĉiuj legantoj de „La Juna Vivo", ĉie en la mondo, kaj deziras grandan sukceson al la Tutmonda Junular-Organizo".

S. kaj C. Smith, Yarmouth, Isle of Wight, Anglujo.

(En la venonta n-ro aperos bildo de la ŝipeto).

## Rubekolo. [1])

Ho! Jen rubekolo!
Proksime ĝi restas.
En neĝa vetero
Malsata ĝi estas.

Serĉante nutraĵon,
Ĝi vigle saltetas.
Bonkore disdonu
Panerojn, ĝi petas.

Nenjo Rimanto (kopirajto rezervita).


## Ĉu vi scias?

1. Kio restas, se oni dishakas liton?
2. Kiu devas eviti malsatulon? (La solvojn vi trovos aliloke).

[1]) Rubekolo = ruĝgorĝo (birdeto).


## NIA VERKILO.

**Skribu du mallongajn frazojn pri ĉiu numero!**




Bildo 1-a: 1. La kurteno pendas antaŭ la fenestro.
2. Mi vidas du kurtenojn.

Bildo 2a: 1. La cigaro estas bona.
2. Ĝi estas bruna.




**Rimarko:** El Elliston Secondary Modern School, Cleethorpes (Anglujo) **mi ricevis sciigon, ke** 100 knaboj faras la frazojn ĉe „Nia Verkilo". Kelkaj el ili sendis frazojn. Bonege! Ne timu erarojn!!! Kiu timas erarojn, neniam kuraĝas labori kaj do neniam ........ progresos!


Tre bonajn frazojn skribis Roy Heelas kaj Johny Lowle. Dankon! Ĉu via lernejo estas granda? Kaj ĉu via instruisto havas nigrajn harojn?

P. K.

## Nederlando—Bulbolando.

Nederlando estas bulbo—lando. En la printempo la narcisoj, tulipoj, hiacintoj kaj krokusoj ekfloras. Oni povas vidi en nia lando grandajn, multkolorajn kampojn kun tiuj belaj floroj. Tio estas tre bela spektaklo.

La unua bulboplanteto, kiu aperas, estas la galanto. Jam en januaro du malgrandaj folioj rigardas el la nigra tero. Ili rigardas, ĉu jam estas sufiĉe varme por la malforta floreto.



Baldaŭ kreskas inter la du folietoj la trunketo kun la floro. Je la deka matene la floro malfermiĝas. Estas danĝera tempo por ĝi. Ja povas frosti, ĉu ne? Kaj tiam ĝi mortas.

Ĉar la galanto estas la unua floro inter la herbo, la abeloj tre-bone povas vidi ĝin. Ili serĉas bongustan mielon.

Unu el niaj klasanoj desegnis la galanton. Ĉu bele?

La infanoj de la elementa lernejo en Edam (Ned.).

## Abelo kaj formiko.

Formiko komencis interparolon kun abelo.

„Vi, abelĉjo, estas tre laborema kaj senlaca. Zorge vi faras vian loĝejon kaj kolektas nutraĵon. Kaj la homoj amas vin pro tio. Sed vidu, mi ne estas malpli bona laboristo. Mi senlace konstruas malgrandajn ĉambretojn, laboras profunde en la tero, riparas vojojn, zorgas pri niaj idoj, sed la homoj tamen ne amas min. Tio ĉi ne estas justa! Se ni, laboremaj formikoj, envenas en la domojn de la homoj, ili tiom bruas, kvazaŭ venus terura malamiko."

„Ĉu vi miras pri tio?" demandis la abelo. „Vi multe klopodas, sed nur por vi mem. Vi kun neniu dividas vian gajnon. Vi vivu kaj klopodu por ĉiuj kaj ne nur por vi mem."

Marin W. Koev Kazanlik, Bulgarujo.

## Rakonto de papilio.

Je iu tago patrino Papilio demetis kelkajn ovojn. Kaj mi estis inter ili. Je solena tago mia ovo subite malfermiĝis kaj mi eliris kiel raŭpo.

Mi komencis manĝi kaj manĝadi. Unu tagon mia haŭto sentis tre streĉa. Tiam mia malmola haŭto glitis de mia korpo. Tio okazis multajn fojojn.

Tiam mi sentis, ke mi devos dormi. Je iu tago mi vekiĝis. Mi vidis, ke mi havas flugilojn. Mi movis ilin. Supren, supren mi iris. For, for mi iris.

John Phippe, Willoughby, N.S.W. (Aŭstralio).
(El la lerneja ĵurnaleto: The Williw-boys own).

## Legendo pri la Akvofaloj de Iguazú.

Sur la landlimo inter Argentino, Brazilo kaj Paragvajo estas la Iguazú-Akvofaloj. Laŭ la opinio de vizitantoj al Usono, ili estas pli grandaj kaj pli belaj ol la Niagara- kaj la Viktoria-Akvofaloj. Sed pro la fakto, ke Iguazú estas tiel malproksime de urboj, fervojoj kaj vojoj, ni ne scias pri la loko. Serĉu ĝin sur via landkarto de Suda Ameriko. Pri Iguazú ekzistas multaj malnovaj legendoj. Jen unu el la plej belaj:

La historio estas pri la granda, nigra birdo, kiu ankoraŭ flugas proksime al la akvofaloj, la *I-yará.*

Iam la *I-yará* estis la mastro de la akvoj kaj la fidela servisto de *Tupá,* la bona spirito de la *Guaraní*-indiĝenoj. *I-yará,* per magio, povis ŝanĝi la aspekton kaj aperi kiel alia homo aŭ besto aŭ birdo; sed ĝi havis la rajton fari tion nur kiam ĝi helpis *Tupá* en bonaj faroj.

Dum bela nokto, kiam la luno brilis per pala, blueta lumo super la vasta ĵunglo, *I-yará* en la aspekto de cervo renkontis *Anga.* Ŝi estis bela knabino, la filino de potenca *Guaraní*-ĉefo. La knabino dolĉe karesis la cervon, kaj *I-yará* tuj per la tuta koro amis ŝin.

Sub la serpentaj grimp-plantoj la bela, malgranda *Anga,* kun aliaj junaj knabinoj el la tribo, naĝis en apuda rivereto, kaj *I-yará.* nun kiel purpura ardeo kun grandiozaj plumoj, dum multaj horoj observis ŝin. Ankaŭ al ŝi plaĉis rigardi la belegan birdon.

Tiam, en la frua printempo, kiam la aero estis parfumplena de la milionoj da floroj, *I-yará* per la helpo de multaj aliaj ardeoj forportis la kompatindan *Anga* al sekreta kaverno, kiu situis malantaŭ la akvofalo *Garganta del Diablo* (Gorĝo de la diablo).

Sed *Anga,* kiu tre timis la mallumon kaj laŭtan bruon de la akvofalo, mortis kaj ŝia spirito iris en la milojn da hirundoj, kiuj malgaje vidis la tragedion kaj ne povis savi ŝin. Tiuj hirundoj ankoraŭ ĉirkaŭ-flugas proksime al la akvofaloj.

La aliaj knabinoj, kiuj vidis la forporton de *Anga,* ne havis la kuraĝon reiri al sia hejmo sen ŝi, ĉar ili timis la koleron de la patro kaj fratoj de *Anga,* kiuj tre amis ŝin. *Tupá* kompatis ilin kaj ŝanĝis ilin en *biguás,* la malgaj-aspektajn akvobirdojn, kiuj neniam forlasas la akvofalojn.

La *Tupá* kondamnis *I-yará* pro lia krimo resti por ĉiam tiu granda, nigra birdo, kiu kaŝas sin malantaŭ la nebuleto de la *Garganta del Diablo,* aŭ staras sur unu el la multaj rokoj kaj observas per malĝojaj okuloj la malfeliĉajn *biguás.*

W. M. G. (Brit.).

## ENIGMOJ.

Mi ricevis tridek (30) provojn; bedaŭrinde ĉiuj estis el la sama lando. Sed eble multaj aliaj ne trovis la solvon, ĉar tre bedaŭrinde en la dua indikilo estis grava preseraro: staris: malgranda, utila besto. Tio devis esti: malgranda, malutila besto. (Rato).

La solvo estas KRISTNASKO (Krokodilo, Rato, Infano, Sciuro, Tigro, Najtingalo, Azeno, Salmo, Korvo, Omaro).

Nur tri kuraĝis klopodi verki rimaĵon: **Dorothy Kilgour** (Brit.) verkis tri, el kiuj mi citas:

La kato kaj la hundo sidis sur mato,
La kato kaj la hundo saltis al rato.

Treege ĉarman rimaĵeton verkis **Ann Wilson** (Brit.):

Mi estas infano
Timata de rano.

Mi ne citas la verkon de la tria provanto, ĉar ĝi ne bone rimas.

Jen la novaj enigmoj:

1. La sekvantaj liter-grupoj formos proverbon, kiam vi metos ilin en la ĝustan ordon: aĉa — Alĉ — ane — est — iub — opl — sĝi — sto.

La jenaj formos alian proverbon: fer — ĝuk — kaj — lab — ore — oru — Pre — vore.

2. Rigardu ĉi tiujn vortojn: Koro — ronki — kiam — amiko — koro. La du finaj literoj de unu vorto estas la komenco de la sekvanta. Via tasko estas trovi similan aron da vortoj, kies signifoj

estas: 1. Krusta fiŝo. 2. Itala urbo. 3. Malĝentile konduti pri iu. 4. Demandante pri kvanto. 5. Krusta fiŝo.

Sendu vian provon antaŭ la 20-a de marto al: s-ro T. K. Slade, 7 Southview Rd., Southampton, Anglujo. Klare aldonu viajn nomon, adreson kaj aĝon.

(Por enigmoj ni ne donas premiojn, sed vi ricevos poentojn. Post iom da tempo ni raportos pri tio en LJV).

**Por matematikemuloj** (vidu la antaŭan numeron): Unu briko pezas 2 kilogramojn.

---

**La solvoj de p. 435: 1.** Lit-er-oj. **2.** Japano, ĉar li estas ja-pano.




**Provizora programo de nia 6-a Internacia Junular-Kunveno en Konstanz, Germanujo**

**(28/7—4/8 1950)**

*(Adreso de la Loka Organiza Komitato: Michel Schmidt, (17 b) Konstanz a.B. Grüngang 9).*

28/7: Alveno de la partoprenantoj. Komuna tagmanĝo. Vespere: solena malfermo, salutvortoj de oficialuloj. Interkonatiĝa vespero kun surprizoj.

29/7: Matene: oficiala akcepto en la urbdomo. Rondiro tra la urbo kaj vizito al ties vidindaĵoj. Posttagmeze: komuna banado kaj naĝado en la lago. Vespere: Germana festvespero.

30/7: Matene: publika diskuto pri la temo ESPERANTO KAJ LA JUNULARO. Sekve oratora konkurso pri tiu temo. Studo de Esperanto-kantoj. Posttagmeze: Naĝado, fotografado. Vespere: vizito al la urba teatro. Eventuale tie granda publika propaganda festvespero kun kontribuoj de ĉiu nacio.

31/7: Tuttaga ŝipekskurso sur Rejno al la konata Rejnakvofalego apud Schaffhausen (Svislando). Aŭstra-Franca festvespero.

1/8: Matene: fakkunsidoj de TJO, de ge-instruistoj kaj aliaj grupoj. Intervjuoj per la loka gazetaro kaj per la radio. Posttagmeze: ekskurso al la translaga Meersburg kaj vizito al ties kastelo. Brita festvespero.

2/8: Tuttaga ŝipekskurso al Bregenz (Aŭstrujo). Vizito al la monto „Pfänder" per ŝnurvagonaro. Vizito al Lindaŭ (insula urbo). Nederlanda festvespero.

3/8: Matene: raporto de la ĉefperantoj de TJO pri la stato de la movado en la diversaj landoj: Proponoj pri la venontjara kongreslando. Instigoj, proponoj. Vizito al la internacia universitato „Insulo Mainaŭ". Posttagmeze naĝado, studo de popoldancoj. Adiaŭa balo.

4/8: Lasta komuna manĝado. Foriro de la partoprenantoj.
Eblas aliĝi al karavano, kiu iras al la 35-a UEA-Kongreso en Parizo.

**Tabelo de la kostoj** (En aliaj landoj oni petu informojn pri la kostoj en sia mono al la L.O.K. en Konstanz. Bonvolu aldoni respondkuponon).

| | Antaŭ 1-4-'50 | Post 1-4-'50 | Antaŭ 1-4-'50 | Post 1-4-'50 |
|---|---|---|---|---|
| | Britujo | | Francujo | |
| ĝis 18-j. ...... | 63 ŝ. | 72 ŝ. | 3000 fr. | 3400 fr. |
| ĝis 30-j. ...... | 72 ŝ. | 81 ŝ. | 3400 fr. | 3800 fr. |
| pli ol 30-j. ... | 81 ŝ. | 90 ŝ. | 3800 fr. | 4300 fr. |
| ne-TJO-anoj 9 ŝ. pli | | | ne-TJO-anoj 400 fr. pli | |
| | Nederlando | | Germanujo | |
| ĝis 18-j. ...... | 33 guld. | 38 guld. | 35 DM. | 40 DM. |
| ĝis 30-j. ...... | 38 guld. | 43 guld. | 40 DM. | 45 DM. |
| pli ol 30-j. ... | 43 guld. | 48 guld. | 45 DM. | 50 DM. |
| ne-TJO-anoj 5 guld. pli | | | ne-TJO-anoj 5 DM. pli | |

La partoprenontoj povas pagi la tutan kotizon al sia landa ĉefperanto. **Francoj** bonvolu pagi (se eble tuj la plenajn kostojn) al: „35-a Universala Kongreso de Esperanto", pĉk. Paris 3208—57, kun la indiko: „Por TJO-Kunveno". **Nederlandanoj** direktu sin al s-ro Geurts, Voorhaven 80, Edam).

Denove ni atentigas ke en la supraj prezoj **ĉio** estas enkalkulita, do: loĝado (en tre bone ekipita liceo!), manĝado (tre bona!) kaj ekskursoj (belegaj!).

Partoprenontoj el Ĉeĥoslovakujo, Polujo kaj la Orienta Zono de Germanujo ne povas transigi monon. Ili senpage rajtas partopreni! Sed — tiucele la L.O.K. volontege ricevos mondonacojn! Ni regule raportos pri tio en LJV. Ĉiu sumeto estos tre bonvena!

Geamikoj, la organiza komitato faris la preparojn: nun ĝi atendas amason da aliĝoj! Vi multe helpas, frue anoncante vin! Uzu por tio la oficiala aliĝilo, kiu troviĝas en ĉi tiu numero. Bone legu ĝin kaj akurate agu laŭ la indikoj! Unue do pagu la duonan kotizon al via landa ĉefperanto (francoj al la UEA-Organiza komitato).

Post via aliĝo vi ricevos la kongreskarton kaj -insignon kun ĉiuj bezonataj informoj de la Loka Organiza Komitato.

Ĉiu zorgu pri propra pasporto, sed oni petu la enirpermeson nur tiam, kiam la L.O.K. estos informinta vin pri tio. Tiam vi certe ricevos ĝin, ĉar la „Military Permit Offices" en la koncernaj landoj estos laŭliste informataj.

Anoncu vin baldaŭ! Post la 1-a de junio ne plu estos akceptataj aliĝoj, pro la prizorgo de la enirpermesoj!

Pli da aliĝiloj vi povas peti rekte al la L.O.K., aŭ al TJO-Centro en West-Graftdijk.

Estas tre allogaj eblecoj resti en Germanujo post la I.J.K. Oni petu informojn al la L.O.K.

## POŜTMARKRUBRIKO.

La poŝtmarkrubriko en LJV estas sukceso. Estas nia celo, ke tio restu. Ni ĉiam havas mankon je interŝanĝpoŝtmarkoj.

Tial ni petas vin: kolektu por ni poŝtmarkojn, ankaŭ tre ordinarajn. Tiel nia rubriko povos ĝojigi multajn junajn (kaj maljunajn) ge-amikojn. Do — kolektu por ni. Dankon!

En la nova jaro ni ricevis p.m. el Germanujo (Heinz Siemes, Günther Schaedel), Nederlando (Kees Baden), Svedujo (Oskar Svanteson), Ĉeĥoslovakujo (Bedrich Pagác), Polujo (Henryk Dabrowski).

Ni dankas vin kaj esperas, ke vi jam ricevis nian sendaĵon.

En nederlanda letero ni trovis 25 belajn poŝtmarkojn. La fraŭlino petis de ni popolkantojn sen aŭ kun muziko. Kiu povus helpi?

Ni ricevis ankaŭ peton de kamarado, kiu volonte havus Esp. p.m. el Sovetio, kaj la danajn p.m. el 1935 (Andersen-Serio). Li promesis belajn aliajn ekzemplerojn.

Ni ne povas servi al li. Kiu el vi???

Libro-Servo, Edam (Nederlando).

## T.J.O.-RUBRIKO.

*(Sekretariino A. Kaagman, Voorhaven 80, Edam Nederlando).*

**Danujo:** Bonvolu atenti, ke la poŝtkonto de la ĉefperanto estas: 73478.

Fine anoncis sin helpantino: f-ino G. Thomsen en Grindstet. Esperu ni, ke dank'al la kunlaborado, la dana sekcio multe progresu!

**Nederlando:** En la somero de 1950 ni organizos du karavanojn: unu al Konstanz, kaj unu al Konstanz + Tirol. Pri la IJK en Konstanz ni ne multe diru: la alloga programo kaj informoj pri la aranĝoj, kiujn vi povas legi en ĉi tiu n-ro, klare montras, ke ĝi estos belega. Ni ne jam precize povas diri la prezon, sed inkluzive de la vojaĝo ĝi estos 80-90 guldenoj.

La granda vojaĝo al niaj Tirolaj geamikoj (27/7—12/8) estos pli multekosta (proksimume 125 guldenojn). Kiu volas legi pri restado en Tirol legu LJV de novembro '48. Tia vojaĝo estas neforgesebla. Bedaŭrinde ni nur havas 6 liberajn lokojn, por TJO-anoj malpli aĝaj ol 30-j. Do, se vi deziras kuniri, rapidu! Anoncu vin ĉe S-ro C. Geurts, lernejestro en Edam.

**T.J.O.-anoj:** Por la antaŭa n-ro de LJV s-ro Symes (Brit.) sendis artikoleton, en kiu li aludas la taskojn de la TJO-anoj. Nu, ni komprenas, ke ne ĉiu povas organizi renkontiĝojn (kvankam tio estas treege grava!), sed ni kredas, ke **ĉiu** ano povas varbi almenaŭ **unu** novan anon! Tio ja estas **tre** simpla tasko. Kaj ankoraŭ pli simple estas pagi vian propran kotizon! Eĉ tion multaj ĝis nun ne faris!

## SKOLTA RUBRIKO.

**Dua internacia tendaro de ellokigitaj personoj.** Ĝi okazis en Nürnberg (Germanujo) dum aŭgusto '49. Ĝin partoprenis skoltoj el multaj landoj.

En la unua tago la estro de la tendaro memorigis la skoltojn pri la vortoj de Baden Powell en la ĵamboreo en Godollo (Hungarujo): „Ĉu vi faros vian eblon por interkonatiĝi kun alilanduloj kaj akiri la tutmondan pacon?"

Ĉi tiu internacia tendaro montriĝis pli sukcesa ol la unua, kiu okazis en la jaro 1948-a.

Estos interese ekscii, ĉu inter la partoprenintoj troviĝis Esperantistoj, kiuj kapablis interkompreniĝi kun alilanduloj, kies lingvon ili ne konis.

**Aŭstralio:** Nun troviĝas 23.000 skoltoj en Aŭstralio; tio signifas gajnon de 4 % dum la pasinta jaro. Por la izolitaj estroj oni komencis korespondajn kursojn.

**Brazilo:** La brazilaj skoltoj faris sian unuan tendaron por la akiro de la ligna insigno (insigno de la ĉefaj lerntendaroj por skoltestroj).

**Ĉilio:** La ĉiliaj skoltoj festis la 40-jaran ekzistadon de sia federacio. Tiucele ili faris ĵamboreeton, en kiu partoprenis trimil membroj.

**Italujo:** Ĉar la jaro 1950-a estas sankta jaro, la italaj geskoltoj sin preparas por akcepti katolikajn kaj ne-katolikajn skoltojn el la tuta mondo.

El Romo oni anoncis, ke la broŝuroj koncernantaj la sanktan jaron estos eldonataj en la ĉefaj naciaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto.

## RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

**„Valor Educativo del Esperanto",** ilustrita hispanlingva broŝuro, verkita de prof. M. Fernandez Menendez. Trafaj argumentoj pri la eduka valoro de Esperanto. Eld. de Imprenta Nacional, Montevideo. Prezo 0,50 peso (0,20 dol.).

**El Esperanto en la opinión de hombres eminentes y diversos Hechos.** 2-a eldono de la hispanlingva propaganda broŝuro de la sama verkisto.

---

**La Germana Esperanto-Asocio** komunikas, ke la 3-a junularkunveno en Germanujo okazos de 30/5-4/6 (post la GEA-kongreso) en Oberreifenberg. Oni petu informojn al la organiza komitato: E. Rabl, Frankfurt a.M. — Praunhaim, Pützerstr. 102.

# KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Aŭstrujo:** 14-j. geknaboj de la Hauptschule Wien 17, Lienfeldergasse 96, deziras korespondi kun la tuta mondo.

**Britujo:** 16 jara lernanto dez. kor. kun judaj geknaboj en la tuta mondo; adr. Aubrey H. Waitz, 147 Greyhound str., Fulham, Londono W 6.

Tri junaj Londonaninoj dez. fondi junulargrupon. Junuloj en Londono turnu vin al f-ino P. Watson, 125 Haig Rd., Plaistow, London E. 13. Ili ankaŭ deziras korespondi kun geamikoj en la tuta mondo!

15-j. junuloj dez. kor. kun francoj k. junuloj el la franca zono de Germ. (ankaŭ franclingve). Norman Smith, 56 Summer Rd., Thames Ditton.

**Bulgarujo:** Mi dez. kor. kun geesperantistoj en la tuta mondo pri jub.pm., sporto, ktp. Georgi Ĉakarov, str. Struma N-ro 18, Burgas.

**Ĉeĥoslovakujo:** Letervesperon aranĝos por 30 komencantoj (lern. de knaba mezlernejo) Alois Bobek, Masarykovo nám. 136, Turnov. Skribu lin!

Alois Trunda, Skorkovského 174, Brno-Zidenice, 16-j. skolto, dez. kor. kun nederlandano.

**Francujo:** La „Kolomba grupo" (25 geanoj) bezonas gazetojn, poŝtk., let. por propaganda ekzpozicio. S-ro Sujet, c.c. Coulommiers (S et M).

26-27-j. geinstruistoj dez. kor. pr. k. gek.oj en Danujo, Brazilo, Aŭstralio, Usono, Svisujo, Finnlando, Aŭstrio, s-ro Delagneau, Les Fourneaux par Chailley.

17 knaboj 12-15-j. dez. kor. kun samaĝuloj en multaj landoj. Adr.: S-ro Lesage, Instituteur à Ker Goat, Le Hinglé (Côte du Nord).

**Germanujo:** Geknaboj de elementa lernejo faras bild-landkarton de Germanujo, Eŭropo kaj aliaj kontinentoj. Sendu bildpoŝtkartojn kaj prospektojn al la instruisto: Jos. Steppan, Kahla/Thür, Rudolst. Str. I.

**Japanujo:** Por montri la valoron de Esp. japana profesoro planas grandan ekspozicion. Geinstruistoj sendu al li desegnaĵojn de siaj lernantoj. Reciproke ili ricevos desegnaĵojn de japanaj infanoj. Sur ĉiu verkaĵo staru la titolo de la bildo, nomo kaj adreso de la infano, aĝo kaj klaso. Adr.: Masao Kakuo, Moriyama-mati-Takaoka, Tayoma-ken.

17-jara junulo deziras korespondi per ilustr. poŝtk. Li havas intereson pri sporto. Isamu Sakai, 2555—5 Kamimeguro, Meguro-Ku, Tokio.

**Nederlando:** 6 skoltinoj, 17-j., dez. kor.: Dini v. d. Beek, Hof van Delftlaan 112; Anne-Marie Bloemhof, v. d. Brugghenstr. 14; Riny Fradus, Hof v. Delftlaan 88; Ella de Langen, Rotterdamseweg 99; Gerda Leer, Markt 13; Corrie Ronteltap, Koningsplein 109; ĉiuj en Delft.

Lernantinoj (9- kaj 10-jaraj) de s-ro W. H. Koopmans, Vosmaerlaan 3, Hilversum, deziras korespondi kun knabinoj el diversaj landoj.

Tri 16-j. knaboj de mezgrada teĥnika lernejo dez. kor. kun tri 15-jaraj knabinoj en sama loko en Francujo. Inĝ. B. B. de Regt, Eendrachtsweg 26b, Rotterdam.